


HISPANA ESPERANTO

Ilustrita ĉiumonata gazeto, por la propagando de Esperanto kaj diskonigo de la Historio, Arto, Literaturo, folkloro kaj naturaj belaĵoj, de nia lando.—Redakcio: JACA, provinco de Huesca.—Julio Mangada Rosenörn

III^a
JARO

NUMNÓ. VII-VIII.—JULIO-AUGUSTO

III^a
JARO



Pordo de la kapelo de «San Victoriano» (San Juan de la Peña)

LA POEZIO ĈE LA HISPANAJ ARABOJ
KAJ
ĜIA INFLUO EN LA KRISTAN-HISPANAN KAJ EN TIUJN
DE ALIAJ SUDAJ POPOLOJ

(Daŭrigo)

Rimarkindaj elektitaj fragmentoj el araba poezio

Laŭ la eminenta Menéndez Pelayo «neniam oni devas flankenlasi iun versaĵon, kiun famigis universala admiro; same oni ne devas akcepti iun, kiu ne havas pozitivajn meritojn», ĉi tio estas nepre plenumota por antologio, sed tion oni ne povas apliki absolute al la hispan-arabaj versaĵoj, ĉar ĉi tiuj ne altiris grandan atenton de orientemaj filologoj kaj erudiciuloj, kaj ankaŭ ĉar la hispan-araba poezio estas malmulte konata; kvankam la nombro da arabaj poetoj estis granda en Hispanujo, en nin nur venis malgranda parto el iliaj verkoj ĉu kaŭze de sinsekvaj invadoj unue (*Almoravidoj, Almohadoj, Benimerinoj*); ĉu kaŭze de la perdo de la arabaj urboj konkeritaj de la kristanoj; ĉu trie ĉar la Inkvizicia Tribunalo bruligis kaj detruis riĉajn bibliotekojn abundajn je arabaj manuskriptoj. Tamen, multon oni savis, kaj ĉi multo sufiĉas por elpruvi la gravecon de la araba poezio: el la multo fragmente iujn versaĵojn ni vidigos, kies hispanaj tradukoj estis farataj de kleraj eminentaj kritikistoj kaj arabemuloj, kiel Johano Valera, Gayangos, k. c.:

Improvizitaĵoj:

Tagon, renkontiĝis poetoj *Ybn-Hudail kaj Ybn-Kutiya kaj al ĉi tiu diris tiu:*

¡Sol, que el mundo iluminas, refulgente!,
¿de dó vienes, varón a quien respeto?
Sun', kiu mondon lumigas, brilanta!,
de kie venas vi? Mi vin respektas!

Kaj *Kutiya* respondis

De donde meditar puede el creyente,
y el pecador pecar puede en secreto.
De kie povas mediti kredanta
hom', kaj sekrete peko virt' aspektas.

En alia okazo, reĝo *Almotamid* diris al skeptika poeto *Ybn-Ammar*.

¡Oye! En el alminar de la Mezquita,
el almuédano llama a la oración.
Jen! De l'tur' moskea venas la lumo,
muezeno diras la preĝordonon!

Kaj *Ybn-Ammar* diris:

La suma de sus culpas infinita
así, tal vez, conseguirá perdón.
El senfinaj liaj kulpoj la sumo
tiel, eble, jam atingos pardonon.

Sed la reĝo reimprovizis:

Bien merece el perdón y la ventura,
porque da testimonios de verdad.
Tion, eĉ feliĉon, li ja meritas,
ĉar li pri la vero al ni atestas.

Al kio *Ybn-Ammar* subite respondis:

Con tal que todo eso que él asegura
no lo tenga por una falsedad.
Fi! Se tio, vel, pro kio hezitas,
kred' sincera ĉe la lia kor' estas.

Alian tagon, *Al-Motamid* promenadis kun *Ybn-Ammar*, ĉe la bordo de l' Gvadalkiviro, kaj *Al-Motamid*, rimarkante kiel la vento ondigos la supraĵon de la rivero kaj ĝian brilon diris improvize:

El viento transforma el río
en una cota de malla.
Ŝtalmaŝaro do fariĝas
la river' se vento blovas.



La poeto ne sciis kiel improvizi por kompleti la versaĵon komencitan de la reĝo, kaj tiam junulino, kiu apude ankaŭ promenis, diris:

Mejor cota ya no se haya
como la congele el rio.
Ni pli bonan jam ne trovas
se rivero glaciĝas.

Al-Motamid enamiĝis kun tiu virino, nomata Itimad aŭ Romaikija, kun kiu li edziĝis amante ŝin dum la tuta vivo ĉar ŝi ankaŭ estis brila poetino.

En la regno de Granada, la hispan-araba kulturo dekadencas rimarkinde, kaj la poezio kalkulas malmultajn poetojn, sed iuj el ili estas rimarkinde eksterordinaraj, ĉar kune kun *El-Jadragüi* (*Ĥadragui*) — 1192-1264 — de *Algeciras*, kiu verkis vivon de Mahometo kalkulantan 12.000 versojn; kun *Esquilula* (*Es-kilula*), princo de *Málaga*, kiu verkis rimarkindan poemon al la reĝo *Abuyusuf* (*Abujusuf*), pro lia triumfo en la batalo de *Ecija* (*Eciĥa*); kun *Abuomar*, sekretario de *Abenalahmar* de *Granada*, kiu, je 1275, laŭ ordono de la reĝo, verkis poemon instigantan la popolon al sankta milito kontraŭ la kristanoj, ni renkontas la samtempe historiiston kaj geografiiston *Abensaid el Magrebi*. Li naskiĝis en *Alcalá la Real* (Granada) je 1212 (?) el fama familio *Beni-Said*, en kiu brilis abundaj literaturistoj, el kiuj estas citinda entuziasma eminenta bibliofilo, kiu, estante guvernestro de *Algeciras* (*Alĥeciras*, tiama gravega urbo), ne sentis humiligon viziti vantan malsaĝulon, kiu posedis kajerojn kun versaĵoj kaj biografioj de verkistoj de *Algeciras*, kaj kiu nur konsentis doni ilin persone kaj ĉe si al la guvernestro se ĉi tiu rekte petus la manuskriptojn, pro kio la eminentulo, *Musa Bensaid* diris: «Mi ne devus konsenti la postulon; sed mi devas ĉi tion fari je la honoro de la kleruloj kies versaĵojn kaj biografioj estas en la libroj: Ĉu vi opinias, ke se ili vivus kaj kunvenus ĉe iu loko, mi ŝanceliĝus iri tuj viziti ilin eĉ min alligi al ili?» *Musa Bensaid* vivis sesdek sep jarojn, kaj de kiam li jam povis legi kaj skribi ne pasis tago dum kiu li ne estis leganta aŭ verkanta. Sed oni konservas de *Ali Bensaid el Magrebi* pli da verkoj ol de iu ajn el liaj familianoj. Li studis en

Sevilla la lingvon kaj la poezion kaj estis li disĉiplo de *Xalubini*; en *Kairo*, *Bagdad*, *Alepo*, *Damasco*, *Mosul* kaj *Basora*, vizitis kaj studis la bibliotekojn kaj interrilatiĝis kun la plej eminentaj sciuloj tiamaj; en *Tunizo* li estis je la servo de l' emiro *Abuabdalá Almostánsir*. kaj dum vojaĝo al Oriento, li mortis en *Damasko*.

La ĉefverko de *Abensaid* estas la *Libro pri la sfero de la literaturo* el du partoj: *El Mogrib* kaj *El Maxriq*. La unua estas kroniko de 1135 ĝis 1243, tre citita de aŭtoroj, konsistanta el 15 volumoj, el kiuj oni konservas iujn: la volumoj X^a kaj XI^a pritraktas geografion pri Hispanujo kun sciigoj pri plej famaj sciuloj kaj pri la regado de iuj omeĵaj, de *Alháquem I^a*; la XV^a pritraktas la regnojn de *Murcia*, *Valencia*, kaj *Tortosa*, *Zaragoza*, *Baleares* kaj *Sevilla*. Alia volumo, kiun oni trovis je la fino de la pasinta jarcento, estas resumo koncernanta finon de *almohada dinastio*.

Ankaŭ li verkis librojn pri la sciuloj de sia tempo, pri historio de barbaraj popoloj, de okcidentaj popoloj, pri sia propra familio, pri la hispanaj poetoj de la VII^a jarcento de la mahomet-ero, versaĵojn kaj kolekton el rakontoj aŭ anekdotoj kun intermiksitaĵoj. Li resumis la geografion de Ptolomeo, kiun profitis poste *Abulfeda*; li verkis geografian kaj historian priskribon de l' Orbo; la priskribon de sia dua vojaĝo al Oriento kaj alian pri sia vojaĝo al *Meko*. Li daŭrigis la epistolon de *Abenházan*, priskribante la literaturan movadon de la mahomet-ero Hispanujo.

Almacari elĉerpis el la verkoj de *Abensaid* grandparte siajn *Analectas*, kaj *Abenaljatabid* laŭdegas lin dirante: «li estas centro de la ringo el siaj famiiianoj, scienco de sia ĝento kaj perlo de sia popolo, klera literaturisto, nelacigebla vojaĝanto, erudicia elserĉadanto de publikaj bibliotekoj, diligenta historiisto inda je admiro».

Jen fragmento el erotika versaĵo hispane tradukita de *Valera*:

Mientras gimen las palomas,
alárgame el vaso lleno,

venga vino, y de mi seno
ahuyente todo pesar
.....

Dicen que por causa tuya
adquiero perversa fama;
que el mundo loco me llama
y que se burla de mí;
que tus amores quebrantan
la energía de mi vida.
que está mi hacienda perdida,
que hasta mi nombre te dí.


Pero yo al punto respondo
que temo más tus desdenes,
que honra, paz, salud y bienes,
en un instante perder...

Dume kveras la kolomboj,
donu min glason da vino
por ke de l'mia la sino
ĝi forign la suferon.
.....

Al ŝi amo mia kaŭzas,
ke min freneza mond' voku,
kaj ke ĉi tiu min moku;
jen malbona mia famo;
ke de l' vivo energion
mian ĉi amo frakasas;
ke mi bienon perdilasas
eĉ honoron mi ŝin donis.

Sed rapide mi respondas
timi pli multe cagrenojn
ŝiajn al mi, ol bienojn,
sanon kaj honoron... perdi...

Kiam *Abensaid* restadis en Egiptujo, sentante profundan
nostalgion al patrolando, li verkis unu el plej belaj kaj rimar-
kindaj poemoj, el kiu jen fragmento en hispana lingvo el ĉer-
pita el la verko «Historio de la Literaturo hispan-araba» de
Angel González Palencia same kiel la antaŭa:



Kolonaro de galerio (San Juan de la Peña)

Este es Egipto, pero ¿dó está la patria mía?
Lágrimas su recuerdo me arranca sin cesar:
locura fué dejarte, ¡oh bella Andalucía!
tu bién. perdido ahora, acierto a ponderar
¿Dónde está mi *Sevilla*? Desde el tiempo dichoso
que yo moraba en ella, lo que es gozar no sé.
¡Qué apacible deleite cuando, al son melodioso
del laúd, por su río cantando navegué!

Gemían las palomas en el bosque, a la orilla
músicas resonaban en el vecino alcor...
cuando pienso en la vida alegre de *Sevilla*
lo demás de mi vida me parece dolor.

¡Y aquellas gratas horas en el prado florido!
¡Y aquella en los placeres suave libertad!
Recordando mi dulce paraíso perdido,
cuanto en torno me cerca es yermo y soledad.

Hasta el eco monótono de la movable rueda
que el agua de la fuente obligaba a subir,
cual si cerca estuviese, en mis oídos queda:
toda impresión de entonces en mí suele vivir.

No eran por la censura mis goces perturbados;
la ciudad es tan linda, que se allana el Señor
a perdonar en ella los mayores pecados;
allí hasta el fin del mundo puedes ser pecador.

La soberana pompa del caudaloso *Nilo*
se eclipsa ante la gloria del gran *Guadalquivir*.
¡Cuántas ligeras barcas en su espejo tranquilo
se ven, al son de músicas alegres, discurrir!

.....

A *Málaga* tampoco mi corazón olvida;
no apaga en mí la ausencia la llama del amor.
¿Dónde están tus almenas ¡oh *Málaga* querida!,
tus torres, azoteas y excelso mirador?

Allí la copa llena de vino generoso
hacia los puros astros mil veces elevé,
y en la enramada verde, del céfiro amoroso
sobre mi frente el plácido susurrar escuché.

.....

Jen mi en Egiptuj'; sed al patrujo, do, kio?
Ĝia la rememoro min plorigas senĉese;
ĝin forlasi malsaĝo, bela Andaluzio!,
ĝian bonon, perditan nun, mi laŭdas karese.

Kie estas *Seviljo*? De la tempo feliĉa
kiam loĝis mi en ĝi, ĝojo min plenforlasis.
Tiam, kia feliĉ', je l' takto melodiriĉa
de l' liut' kaj kantante, mi riveron barkpasis!

Ĉe la bordo, arbaren, de l' kolomboj la kvero;
la muziko aŭdiĝis ĉe la altano najbara...
pensi pri la *Sevilja* gaja viv', senespero!
faras al mi la nunan esti tute amara.

Ho; agrablaj la horoj ĉe l'florhava ebena!
Por plezuroj tiama milda mia memvolo!
Mi, rememorigante pri perdita l'edeno,
kredas min en dezerto, en kompleta izolo.

Monotona la eĥ'de turniĝanta, laŭ plaŭdo,
rado, kiun turnadas de la akvo la fluo,
restas, kvazaŭ proksima ĝi, ĉe mia la aŭdo:
tiamajo persistas mia, ankaŭ nun, ĝuo.

Miaj ĝuoj ne havis de l'cenzuro riproĉon,
ĉar de l'urbo beleco Dion bone disponas
por aŭdigi indulgan ĉiam lian la voĉon;
ĝis la fino de l'mond', Li tie ĉion pardonas.

Akvabunda la pompo tre majesta de l'Nilo
eklipsiĝas pro l'gloro de la Gvadalkivir',
ĉar ĝirave spegulas en mirinda trankvilo
multajn barkojn, dum gajas la muzik', jen la mir'!

.....

Eĉ *Malago* ne estas de la kor'forgesata,
ne ĉe mi estingiĝis ama flamo pro l'foro.
Kie ciam terasoj, turoj—ha *Malago* amata!—
rigardejo mirinda, estas? Diru al Koro!

Tie plenan pokalon da bongusta vin'fama
mi milfoje ja levis al ĉiela lazur',
kaj ĉe l'verda l'aleo, milda vento tre ama
frunton mian kisadis kun agrabla susur',

.....

Pasaron estas dichas, pasaron como un sueño,
nada en pos ha venido que las haga olvidar;
cuanto Egipto me ofrece, menosprecio y desdeño;
de este mal de la ausencia no consigo sanar.

(Continuará)

VISITA DE INSPECCION

En cumplimiento de Orden de la Subsecretaría del Ministerio de Instrucción pública y Bellas Artes se gira esta visita, y, como resultado de la misma, se emite el siguiente informe:

En el año 1903 se creó la primera Sociedad española para la propaganda del Esperanto; y, en el año 1925, como consecuencia del Congreso Nacional Esperantista, se reconstituyó la Sociedad, con el nombre actual de «Sociedad Española Esperantista», y se fijó su domicilio, que es el que hoy tiene, en el piso 1.º de la casa número 10 de la calle de Sagasta, de esta Corte, en donde tiene establecida su organización Central la Cruz Roja.

Integran la Sociedad esperantistas aislados, en grupos y en federaciones regionales de grupos; y a la Directiva superior, que reside en Madrid, pertenecen dos Vocales por región.

Las finalidades de esta agrupación son: propagar el Esperanto en España y cooperar a la acción de las demás sociedades similares que funcionan en los demás países.

Persiguiendo estos fines viene realizando una labor inteligente, perseverante y entusiasta; organiza cursos gratuitos de esperanto en todos los centros oficiales y particulares que lo desean y, con caracter oficial, dió cursillos para maestros y maestras de la provincia de Madrid; da clases y conferencias por la radio; consiguió que se adopte el Esperanto para los telegramas diferidos extranjeros, y que se publicara en Esperanto la Guía oficial de Sevilla y el libro del VII Congreso español de Esperanto; ha celebrado un Congreso esperantista en Sevilla y otro en Oviedo, llevando a este último una exposición de trabajos escolares, en Esperanto, de dieciocho países extran-

Pasis tiu feliĉo, kiel rev'delikata,
poste venis nenio por forgesi, do, ĝin;
Egiptujo, nu, estas de mi jam malsatata;
el ekzila malsan', neni' kuracos jam min.

(*Daŭrigota.*)

INSPEKT-VIZITO

Plenumante la Ordonon de la Vicsekretario de la Ministerio de Publika Instruado kaj Belaj Artoj, oni faras ĉi tiun viziton. kaj, kiel rezultato de la vizito mem, oni donas la jenan informon:

Je 1903, oni fondis la unuan hispanan Societon por la propagando de Esperanto; kaj je 1925, kiel sekvo de la Nacia Esperanto-Kongreso, oni reorganizis la Societon kun la aktuala nomo «Hispana Esper-Asocio», kaj oni difinis ĝian loĝejon, kiu estas nune tiu centra de la Ruĝa Kruco, 1.^a etaĝo de la domo n.^o 10.^a de la strato Sagasta de ĉi tiu urbo.

La Asocio konsistas el izolitaj esperantistoj, el grupoj kaj el regionaj federacioj el grupoj; kaj al la supera Komitato, loĝanta en Madrido, apartenas du Voĉdonantoj po regiono.

La celoj de ĉi asocio estas: disvastigi Esperanton en Hispanujo kaj kunlaboradi kun samaj asocioj fremdaj por la triumfo de Esperanto.

Por atingi tiujn celojn ĝi efektivigas saĝan laboron konsantan kaj entuziasman; organizas senpagajn kursojn de Esperanto en ĉiuj oficialaj kaj privataj instruejoj dezirantaj instrui Esperanton kaj, oficiale, klarigis kursetojn por geinstruistoj de Madrido; klarigas la lingvon kaj faras paroladojn pri ĝi per radio; trafis enkonduki Esperanton por la prokrastitaj telegramoj al fremdlando kaj aperigi esperanten la oficialan Gvidlibron de Sevilla kaj la libron pri la VII hispana Kongreso de Esperanto; okazigis esperantajn kongresojn en Sevilla kaj Oviedo, organizante por ĉi tiu ekspozicion el lernejoj laboritaĵoj per esperanto kiun partoprenis 18 fremdaj landoj; instalas, ĉe Komerca Foiro de Gijón, esperantan fakon; distribuas diplomojn pri kapableco.

jeros; instaló, en una Exposición de Muestras de Gijón, una sección de útiles esperantistas; distribuye diplomas de capacidad a los alumnos de su Instituto, previos exámenes que se hacen, para preparar personal capacitado para la enseñanza; edita una revista, estableciendo el intercambio con las de las demás naciones; regala folletos, programas, claves, circulares y demás abundante material de enseñanza y de propaganda; está organizando, para celebrarlo en Zaragoza, el IX.º Congreso nacional esperantista; aspira a prestar una utilidad práctica al fomento del turismo en España, y a que se implante oficialmente en ella el Esperanto; está afiliada a la organización internacional de Esperanto, para asistir, como lo viene haciendo, a los Congresos internacionales que se celebran anualmente, y contribuye a dar a conocer fuera de España lo que ésta representa en todos los aspectos del progreso humano.

Para esa labor cultural que viene realizando esta Sociedad, que lleva una marcha ascendente y progresiva, no dispone de otros recursos que el que representa la cuota anual de dos pesetas que abonan unos 400 asociados y la subvención que da el Ministerio de Instrucción Pública, que ascendió el año anterior a 1.500 pesetas, cubriéndose el déficit con la aportación voluntaria que hacen algunos esperantistas entusiastas, que son escasos en número para cubrir esas diferencias.

Madrid, 24 de Abril de 1930.

El Inspector,
CHACON

PRI MITOLOGIO

(*Daŭrigo.*)

SATURNO. LIAJ FILOL. TITANOJ

Titano devis heredi la regecon el Uranuso, sed ĉu tial ke Saturno eltronigis la tiranon kaj malaperigis la riskon al malliberigo por si kaj por siaj ge fratoj, ĉu tial ke Titeo tion petis, ĉu tial ke la kripliginto ne konsentis forlasi al aliaj manoj la frukton de sia krimo, la fakto estas, ke Titano, la plej aĝa, cedis siajn rajtojn al Saturno (Kiu antaŭe edzigis kun sia fratino

al lernantoj sukcesintaj per ekzamenoj pri la lingvo, por prepari kapablan instruistaron laŭ plano de la Instituto; eldonas gazeton, kiun interŝanĝas kun aliaj de la ceteraj landoj; donacas broŝurojn, programojn, ŝlosilojn, cirkulerojn kaj plian propagandmaterialon; celas okazigi la IX.^{an} Nacian Kongreson de Esperanto en Zaragoza; pretendas liveri praktikan utilon por la progresigo de l' turismo en Hispanujo kaj ke oficiale enkonduku Esperanton la Registaro en la landon; estas alligita al la internacia Esperanto-organizaĵo, por ĉeesti, kiel faris ĝis nun, la internaciajn Kongresojn ĉiujare, kaj helpas diskonigi al fremdlandanoj ĉion pri Hispanujo laŭ ĉiaj vidpunktoj de la homa progreso.

Por tiu kultura laboro, kiun efektivigas la Asocio, senĉese progresante, nur havas la rimedojn, kiujn liveras al ĝi la jarkotizo el 2 pesetoj jare pagata de proksimume 400 membroj, la subvencio donita de la Ministerio de Publika Instruado, kiu estis el 1.500 pesetoj la ĵus pasinta jaro, saldante la deficiton per la memvola mondonaco de iuj entuziasmaj esperantistoj, malmultenombraj. Madrido 24.^{an} de aprilo de 1930.—La Inspektoro: CHACON.

Rimarko: La Inspektoro demandis kiel oni povis eldoni gazeton kaj fari aliajn servojn, kaj oni klarigis al li pri la sindonemo de iuj samideanoj por eldoni la gazeton, k. t. p.; tial li redaktis en ĝenerala senco laŭ estas dirite.

Rheo aŭ Cibeleso) sed kondiĉe ke la edzo estu manĝonta ĉiujn ĵusnaskitojn, celante konservi por sia posteularo la rajton okupi la tronon. Oni diras, ke je la komenco, Saturno avide kaj plezure manĝis la ĵusnaskitojn kaj ĵusnaskitinojn ne atentante la sekson, fidela je la promeso. Cibeleso ne estis promesinta tion, kion Saturno, haj ŝi malaprobis eĉ abomenis konduton de sia edzo, kaj ŝi, nepova je forto, por eviti kanibalecon de la edzo, uzis ruzecon kaj donis al Saturno ŝtonojn envolvitajn en naskiĝtolaĵoj, kiujn la barbara kaj bruta edzo manĝis same, kiel se ili estus la ĵusnaskitoj. Tial Cibeleso savis Neptunon, Plutonon, Vestuson (Vesta'), Cereson, Jupiteron kaj Junon la du lastaj estis dunaskitoj.

Ĝenerala opinio diras, ke Cibeleso trompis Saturnon per ŝtonoj; sed iuj opinioj asertas ke tia trompo estis uzata nur por savi Jupiteron, kiu, kvankam la malplejaĝa estis la plej potenca. Laŭ la lastaj opinioj, Neptuno, Plutono, Vestuso kaj Cereso, trairis la gorgon de Saturno, en lian stomakon, kiu ne povis disgesti ilin pro kio ĉi tiu restis vivante ĉe la patra stomako; sed Saturno, englutinte la ŝtonon anstataŭantan Jupiteron, estis kaptata de kruelaj doloroj. Feliĉe por Saturno kaj por la englutitoj, diino nomata Metiso (laŭ iuj *Metis'o* signifas *scio*), kies devenon oni ne scias, sperta je medicino, donis al Saturno ian trinkaĵon, per kiu li unue vomis la ŝtonon, sekve la vivantajn englutitojn. Tamen, ĉi tiu lasta opinio ne estas la plej akceptita, kaj oni supozas, ke Saturno englutis tiom da ŝtonoj, kiom da gefiloj estis savataj de Cibeleso, kaj ke ĉi tiu kaŝis la gefilojn ĉe diversaj regionoj, ĝis kiam la Titanoj komandataj de la plej aĝa atakis kaj venkis Saturnon. Cibeleson amis Jupiteron pli, ol ceterajn gefilojn.

ENLANDA KRONIKO

Zaragoza. Okaze de vojaĝo de la kronikisto, ĉi tiu vizitis la grupon «Zaragoza Esperantista» kaj povis konstati la forton, vigecon kaj entuziasmon de ĉiuj ĝiaj multenombraj membroj. Rimarkinda fakto estas la foketo el blindaj samideanoj tute flue kaj sufiĉe karekte parolantaj esperanton. La grupo daŭrigadas siajn ekskursojn al najbaraj vilaĝoj en kiuj ludas la piedpilkon iuj el la membroj, kaj okaze de la ekskurso kaj ludo oni faras gravan propagandon. Ankaŭ ĉe Zaragoza mem, per kunvenoj tre oftaj en kafejo por praktiki la lingvon, la grupo faras propagandon.

La vojaĝinto ankaŭ vizitis la loĝejon de la grupo «Frateco» vespere, sed bedaŭrinde li ne renkontis samideanojn kaj li ne povis resti tie ĝis la horo, je kiu, nia kompetenta samideano S-ro Oros klarigis kurson pri franca lingvo.

«Zaragoza Esperantista» okazigis, la 12.^{an} de julio, gravegan feston. En la teatreto «Fuenclara» sperta aktoraro el amatoroj rimarkinde ludis dramon komedion «Ya no es así la parábola»

(Jam ne estas tiel la parabolo), originale verkita de S-ro Manuel Grao Gracia, entuziasma samideano nia de la dirita grupo. Estas citinde, ke la drama komedio entenas esperantajn scenojn, pro kio la propaganda efiko estis granda, ĉar Esperanto aŭdiĝis kvazaŭ itala lingvo. La aŭtoro estis aplaŭdata entuziasme de la publiko same kiel la aktoroj. Dum la festo oni disdonis gravajn cirkulerojn pri Esperanto en Hispana lingvo, kaj la blindula fakō de la grupo ludis la himnojn «La Espero», «Tagiĝo» kaj «Esperanto super ĉio» krom aliaj muzikaĵoj, kaj tial ke la blindaj muzikistoj estas veraj virtuozoj, ili estis tondre aplaŭdataj kaj kore gratulataj kune kun la aŭtoro kaj aktorararo. Rimarkinde estas la antaŭeniro kaj progreso de ĉi tiu grupo, kiu dum unu jaro de la fondo en ĉi daton varbis cent kvindek membrojn, el kiuj triono estas fervoraj propagandistoj, kiuj aktive, vigle; laŭ diversaj manieroj agadas senĉese.

Madrid. Grava nova semajna gazeto «Rebelión» aperigas esperantan fakon, ĉar la eldonistoj konsciis la gravan rolon de Esperanto.

La Esperantista Laborista Grupo vigle agadis eĉ sukcesplene kaj ĝi promesas multe pli por la nova jaro. Ĉi tiu entreprenas gravan celon: starigi Laboristan Esperantistan Federacion.

La grupo «Antaŭen» okazigis rimarkindan propagandfeston kiu konsistis el parolado de S-ro Carlos de San Antonio pri progreso kaj disvolvigado de Esperanto ĝis nun, projekcio de la belega kaj rimarkinda esperanta filmo de la Kongreso de H. E. A. en Oviedo, vidiganta la belegan kamparon de Asturias, kaj fine el varmaj entuziasmaj kaj elokventaj paroloj de la Prezidanto de la grupo S-ro Luis Lozano.

Gijón. Astura Esperanto-Asocio okazigis, la 8.^{an} de la ĵus pasinta junio, gravan feston por solenigi Esperanton: matene estis meso kaj vespere solena vespermanĝo, kiun prezidis S-ro Tomás Guisasola, Rektoro de la Katolika Klubo; parolis S-roj: Isidoro Cortina, prez. de la Katolikaj Junularoj, kaj Rufino Menéndez kaj pastro Jozefo de la Torre, kaj faris la resumon S-ro Rua, prez. de «Astura Esp.-Asocio», rekomendante al la Katolikaj Junularoj la alprenon de Esperanto. Oni sendis salut-telegramojn al naciaj kaj fremdaj organaĵoj.

La Komitato konsistas el: Episkopa Moŝto de Asturias, d-ro. Johano Bautista Luis Pérez, Hon-prezid; S-ro Francisco Me-

néndez Rua, agrikultura inĝen., prez., S-ro. Emilio Tuya García, ĝenerala inpektoro de doganoj, vicp.; S-ro Juan A. Zarracina ĝenerala sekret.; S-ro Salvador García, sekr.; S-ro Enrique Mengod, trez. S-roj Calixto de Rato (medicina d-ro), Joaquín González (pastro), Fernando García (bienulo), Florencio Villa (supera profesoro) kaj Gerardo M. Marina (elektra meĥanikisto), konsilantoj.

En la Profesia Komerca Lernejo oficiale la profesoro S-ro Antonio Rodríguez Ponga de ĉi Lernejo estis rajtigata, por klarigi Esperanton, de la jena rezolucio:

«La Vicsekretaria Moŝto de la Ministerio de P. I., la 9.^{an} de junio diras la jenon:

Kaŭze de via peticio al ĉi Ministerio pri rajtigo al tiea profesoro S-ro Antonio Rodríguez Ponga por klarigi Esperanton ĉe tiu Lernejo dum la somera libertempo. Ĉi Vicsekretario favore decidis la peton sed atentante ke la instruado estu senpaga kaj ne havu akademian valoron.»


Tial en la Lernejo disvolviĝadas la kurso, kiu tamen valoros laŭ la Reĝa Ordono konsideranta *merito oficiala* la ateston pri kapableco, donita de la Ministerio de P. I. je 1911. Ĉi tio estas nova sukceso de H. E. A.

Vigo. Nia malnova kaj sperta samideano S-ro Antonio Jiménez Verger, kiu deĵoras sur la granda torpedoboato «Sánchez Barcáiztegui» vizitanta baldaŭ fremdajn havenojn, sukcese malfermis kurson de Esperanto por la ŝipanaro, ĉi tiu kurso estos fruktodona ĉar vidigos utilon de Esperanto.

Las Palmas (Canarias). La ĉi tiea esperantistaro sin sentas forta kaj kapabla por entrepreni gravan taskon: eldoni revuon por diskonigi Esperanton en la Insularo kaj doni al tutmondaj samideanoj konojn pri la historio, folkloro; komerco, k. t. p., de la Insularo. Je la fino de aŭgusto aperos la unua n-ro. Abonprezo: por Hispanoj, SES peset, jare; por fremduloj SES sv. fr. Adreso: Esp.-Oficejo «Kanaria Insularo.» Str. Pedro de Vera, 9. Las Palmas.

Jaca. En la somera Universitato estis elmontrado de Esperanto Progreso por abunde riĉa ekspozicio el gazetoj, afiŝoj, gvidlibroj, fotoj, k. t. p., instalita en vasta salono. En ĉi Universitato disvolviĝas kurso.

Ferrol. Rapide jam ekfruktiĝas la obstina propaganda la-



Tombaro de aragonaj nobelu'oj (San Juan de la Peña)

boro de nia nelacigebla samideano S-ro Salvador Oliĝan, Dank' al ĝi alia militŝipo, «Dato», havas grupeton el samideanoj. Jen efika laboro gvidata de vera zamenhofa sento ĉe medio tre malfavora pro influo de altranga kaj fanna kuracisto de la urbo, kiu bedaŭrinde forlasis Esperanton por fariĝi idisto.


NEŬTRALULOJ KAJ NENEŬTRALULOJ

Estas bedaŭrinda la nekonscio aŭ la partia pasio de tiuj esperantistoj, kiuj agadas kontraŭ la neŭtrala universala Esperanto-movado; ili falis en grandan eraron. De unu flanko «Katolika Espero», de alia flanko «Sennaciulo» vidigas la tendencojn varbi nure por siaj respektivaj asocioj kiel eble plej multenombrajn adeptojn, flankenlasante aŭ eĉ malrekomendante la neŭtralan movadon, opiniante malsaĝe, ke ĉi movado, per siaj naciaj aŭ enlandaj kaj universala organizaĵoj, ne akcelas la alvenon de la triumfo de Esperanto aŭ estas danĝera al iliaj respektivaj organizaĵoj. Unue, dank' al la konstanta, entuziasma, sindonema, laboro de la neŭtraluloj, la esperantista katolikaro, la sennacieca esperantistaro kaj aliaj partiaj aroj el esperantistoj, ekzistas kaj rimarkinde progresas, por la bono de Esperanto, kaj laŭdinda estas la plinombrigo de ĉi tiuj apartaj partiaj organizaĵoj esperantistaj; due, la neŭtrala movado, pro sia neŭtraleco mem, per la enlandaj organizaĵoj, seninterrompe altiras atenton ĉies kaj iom post iom atingas interreson eĉ helpon de la Registaroj, sendanĝerigante la vojon al oficiala alprenado de Esperanto por la instruplanoj de la lernejoj kaj des pli atingos de la Registaroj kiuj anj, ju pli potencaj aŭ multenombraj estu la enlandaj neŭtralaj organizaĵoj. Fakte konvinkas pri ĉi tio lasta: sperta, kompetenta samideano de USSR ĉeestis la Universalan Kongreson de Esperanto en Danzig kaj sciigis pri la granda soveta Esperanto-movado kaj pri la granda helpo de la soveta Registaro al Esperanto, ke la Registaro tute bone konsciis utilon de Esperanto kaj neceson ĝin oficialigi por instruplano de la lernejoj, sed la

Registaro ne decidis oficiale pri la lingvo por eviti, ke la malamikaj Registaroj juĝu Esperanton lingvo de komunistoj kaj tial decidu kontraŭ Esperanto.

La enlandaj kaj tutmonda neŭtralaj Esperanto-movadoj ne baras la vojon, ne malhelpas la disvolviĝon kaj progreson de la neneŭtralaj; tute male, la neneŭtraluloj deflankiĝemaj devas konvinkiĝi, ke inter ili estas multaj, kiuj samtempe apartenante al neŭtralaj movadoj, vige, entuziasme, sindoneme, agadas por siaj respektivaj neneŭtralaj unuiĝoj, ĉar ili estas veraj pioniroj klare konsciantaj devon por antaŭenpuŝi Esperanton al Registaroj per enlandaj kaj tutmonda neŭtralaj movadoj kaj samtempe por agadi ĉe la aparta plej kara kampo laŭ intimaj koraj celoj aŭ idealoj, ĉar ili ankaŭ konscias la utilon de kiel eble plej multenombraj neneŭtralaj organizaĵoj apud kiel eble plej potencaj neŭtralaj. Kial katolikoj, proletoj aŭ iuj aliaj, ne aliĝas al neŭtralaj organizaĵoj? Atentu, superĉio la proletoj, ke la nuntempa Esp-movado neŭtrala konsistas el humiluloj apenaŭ havantaj pli ol necesajn monrimedojn por la vivo, ĉu estas burĝoj la instruistoj, kuracistoj, inĝenieroj, k. t. p., kiuj estas envicigitaj de la neŭtrala Esp-movado? Kie estas ĉe ni kapitalistoj? Se iuj estus, ili estas estimindaj, ĉar ili estas idealemuĵoj konsciantaj, ke mono ne estas vera ĉionhelpilo.

